# TEA-BULTENO

3ª JARO — FEBRUARO 2000 — NUMERO 2


## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | M | |
| 2 | M | Ordigo de HEMEROTEKO |
| 3 | Ĵ | |
| 4 | V | Kartluda vespero: Rumio |
| 5 | S | |
| **6** | **D** | |
| 7 | L | h.17 - Legemuloj kunvenas |
| 8 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 9 | M | |
| 10 | Ĵ | |
| 11 | V | Artikoloj de Stefan Maul el MONATO |
| 12 | S | |
| 13 | **D** | |
| 14 | L | h.17 - Legemuloj kunvenas |
| 15 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 16 | M | |
| 17 | Ĵ | |
| 18 | V | Navigado interreta |
| 19 | S | |
| 20 | **D** | |
| 21 | L | h.17 - Legemuloj kunvenas |
| 22 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 23 | M | |
| 24 | Ĵ | |
| 25 | V | **TOMBOLO** |
| 26 | S | |
| 27 | **D** | Gastronomia Konkurso |
| 28 | L | h.17 - Legemuloj kunvenas |
| 29 | M | Ordigo de TEA-arkivo |




**Semajno de**

★



**Internacia Amikeco**

Kiu panon donas, malsaton ne konas.

*El Esperanta Proverbaro*

# JARA ASEMBLEO DE TEA

### Dimanĉon la 16an de januaro 2000

### Morala raporto de la Prezidanto

*Edvige Ackermann*

Jen ni finfine alvenis al la mita jaro 2000, sed ĉu io ŝanĝiĝis? Certe ne, almenaŭ por TEA ĝis nun, kaj mi eĉ kuraĝas diri: bonŝance! Alimaniere, tiu ĉi asembleo okazus en tute alia loko, aŭ, pli bone kaj plejverŝajne, ĝi tute ne okazus.

Vi certe komprenis mian aludon al la situacio de nia sidejo: ni riskas vere troviĝi pli-malpli rapide sen ĝi kaj sen ebleco daŭrigi nian agadon. Malfacilas agadi sen ejoj kie labori, renkontiĝi, kunsidi. La anonco pri renovigaj laboroj en la domo kaj la konsekvenca neceso forlasi tiun ĉi lokon, frapis nin abrupte, precipe ĉar ni bone konscias - ankaŭ pro antaŭaj spertoj - kiom malfacile estos lui alian sidejon, se entute ni havos la financan forton por tio. Tiu ĉi estis la plej grava okazintaĵo de la jaro 1999 kaj post ĝi, ĉio alia fariĝas preskaŭ banala kaj senreliefa.

Kiel kutime, nia Asocio klopodis aktiviĝi en plej diversaj kampoj, verdire kun bonaj rezultoj; mi ne volas nun listigi la faritaĵojn, tion faros la sekretario tre detale kaj akurate. Du aferojn tamen permesu al mi rimarkigi: la laboron por enkomputiligo de la biblioteko, fare de Liliana Siega Delmonaco, kaj la laboron por ebligi tion ĉi fare de Eraldo Sepulcri. Absolute mirinda komuna agado, kiu permesos al ni pli bonan konon kaj taŭgan ekspluatadon de nia valora libra trezoro.

Tio, kion mi devas ankaŭ ĉifoje substreki, estas la manko de subteno al nia asocia vivo, al sukceso de Esperanto-kursoj. Ĉu vere ni faris ĉion kio estis en niaj eblecoj? Vigla estraro malmulton povas realigi sen partopreno, apogo, kunlaboremo, helpo kaj iniciatemo de la asocianoj. Okaze de ĉiuj asembleoj en la lastaj jaroj, mi pledis por tio, mi invitis vin ĉiujn proponi, sugesti, elpensi ion por plibonigo de la programoj, por plivigligo de nia agado, por elsalti de stagnaj pozicioj. Ja, certe, fordono de iom da propra libera tempo estas bezonata, kelkaj tion faras tute nature kaj regule, aliaj nur de tempo al tempo, aliaj neniam, aliaj nur post varma instigo, ktp. Estas klare, ke ju pli da personoj helpas kaj kunlaboras, des pli da rezultoj oni havas.

Ĉefa tasko por esperantisto estas la disvastigo de la lingvo kaj ni devas konstati ke niaj fortoj ĉirilate lamas. Ni bezonus pli da instruistoj, pli da rimedoj, pli da helpo en la informado, pli da interesiĝo flanke de ĉiuj por propagandi la kursojn. Ĝis nun tio, kion ni sukcesis fari kaj elpensi, ne sufiĉis, eble nia prezentado ne taŭgis, ne

allogis, eble informado lamis. Ni tamen ne rezignas, venontan jaŭdon startos nova kurso: tiam espereble lernantoj venos.

Mi invitas vin iom pli interesiĝi kaj subteni nian Asocion. En la nuna momento, kiam la estonteco tute ne estas klara kaj promesoplena pro problemoj ligitaj al eltrovo de ejo kie pludaŭrigi nian agadon, ni kuniĝu firme kaj persiste, ni esploru senĉese ĉiajn eblecojn, harmonie kaj sentime. Por la centjariĝo de TEA ni devas atendi ankoraŭ ses jarojn: mi volus atendi ilin en taŭga sidejo, laborante kun entuziasmo por plifortigo de Esperanto en nia urbo kaj en nia regiono kaj por solena festado de tiu evento. Ĉu vi?

## Agadraporto de la sekretario

*Elda Doerfler*

Kara TEA-anoj!

Komence de jaro 2000 ni asemblee kunvenas por kune rigardi kion TEA-gvidantaro faris (aŭ ne faris! - tio dependas de via kritikemo!) dum la jaro 1999[a].

Grandaj, publikaj manifestacioj ĉijare ne okazis - eble ni estis tro elĉerpitaj pro la du okazigitaj en 1998[a] jaro. Nu, mi pritraktu la tiel diritan ordinaran aktivecon de Esperanto-grupo, komencante per la:

### Programoj en klubejo

La agendo de nia asocia informilo daŭre prezentis ĉiuvendredajn programojn. Normale, en mardoj, oni sindediĉis al ordigado de la tuta arkivo, al enkomputiligado de libroj en la bibliotekan programon, al preparo de la diversaj aranĝoj. Jes, en la agendo ni proponas plurajn eblecojn, kiuj tamen kutime estas vizitataj nur de kelke da interesitoj. Se vi legas la raportojn de 1998, '97, '96 ktp, tiam vi legos ĉiam la samajn plendojn, do ĉijare mi ne insistas pri via malmulta partopreno en niaj preparitaj programeroj, kaj nur enlistigas kion ni sukcesis fari malgraŭ via malĉeesto. Okazis diapozitivo-projekciadoj pri pasinteco de TEA, famaj esperantistoj, karsto, italaj kaj eksterlandaj vidindaĵoj kaj Vjetnamio; traduka ekzercado, prelegoj pri movado, unu tre aprecita muzik-vespero, kart-ludado, legado de interesaj artikoloj el Esperanto-gazetaro k.a. Al la koncernaj prizorgantoj de la programeroj iru mian personan dankon, ĉar mi bone scias, kiom da laboro postulas tiu pretigado.

Escepto rilate al malmultnombra partopreno, estis dum la decembra tagmanĝo, majstre preparita de niaj elstaraj gekuiristoj Susy kaj Silvio, kaj la antaŭjarfina festo, kun bufedo kaj disdonado de donacetoj.

En la jaro estis niaj gastoj: geedzoj Sudec, kiuj i.a. estas membroj de TEA, Stian Haklev kaj James Resende Piton. Ĉi-lasta prelegis du fojojn pri tre interesaj temoj: «Esperanto-filatelo: dokumentoj el nia historio» kaj pri Brazilo kaj Sinkrotrono.

### Tradiciaj Esperanto-renkontiĝoj ekstersideje

**Semajno de Internacia Amikeco.** Dimanĉon la 27[an] de februaro, ĉeeste de pli ol 30 personoj venintaj el nia regiono, Aŭstrio kaj Kroatio, okazis vizito al la Paperfabriko ***Burgo*** en ***Duino***. La tuto tre bele disvolviĝis, ankaŭ danke al perfekta interpretado de Manuel Rovere el Udine. Tre gastema la akcepto de la responsuloj prizorgantaj tiun viziton: je la alveno kaj foriro oni regalis la vizitantojn per vere abunda bufedo. Pli poste, komuna tagmanĝo ĉe agroturisma restoracio.

**Festo de Amikeco sur *Monte Forno*.** Nombra grupo de aŭstraj, italaj kaj slovenaj gesamideanoj surgrimpantaj diversflanke de la monto, kunvenis surpinte kaj, laŭtradicie, tostis per ŝaŭm-vino ĉe la simbolo de la trilanda renkontiĝejo. Ĉiuj surhavis la Alp-Adriajn T-ĉemizojn, per kio iom da propagando ja estis farita.

**Zamenhofa Festo.** Oni ĝin festis la 12[an] de decembro: laŭprograme vizito al la ekspozicio: KRISTANOJ EL ORIENTO, kiun sekvis tagmanĝo ĉe Junulargastejo. Pli ol dudek homoj ĉeestis. Tiam oni rememoris nian Majstron per legaĵoj el LA VIVO DE ZAMENHOF de Privat. Post la serioza parto, priesperantaj kvizoj donis eblon gajni malgrandajn premiojn.

**Esperantlingva Meso.** Okazis la 18[an] de decembro, posttagmeze, celebrita de pastro Ammer. Dum la Diservo, oni aŭskultis la belegajn voĉojn de deko da virinoj, el la koruso IVAN GRBEC, kiuj kantis tradiciajn kristnaskajn melodiojn.

La 6[an] de junio, Anna Rustici organizis belegan ekskurson en ĉirkaŭaĵo de Triesto, laŭ pado rigardanta al la maro: *Aurisina-Santa Croce*. Tiu bela promenado finiĝis per bongusta tagmanĝo ĉe la agroturisma bieno de familio *Radovic*. Partoprenantaro multnombris.

En la tradicia antaŭsomera **ekskurso tra Slovenio,** zorge de la Ljubljana societo, pro diversaj kialoj bedaŭrinde neniu el Triesto povis partopreni.

### Pri kongresoj/konferencoj

Triesta esperantistaro ĉijare vojaĝis al Berlino por la 84[a] UK kaj al Hanojo por la 2[a] Azia Kongreso. Krom tiuj ĉi gravaj eventoj, oni partoprenis en diversaj aranĝoj okazintaj en Italio, Nederlando kaj Svislando.

Pluraj el ni aliĝis al la 11[a] Alp-Adria Konferenco, organizita en Pula de Marija Belošević (Kroatia Esperanto-Unuiĝo) kunlabore kun la sekretario Edvige Ackermann. Sekve de tio kaj pro iniciato de Belošević, fine de novembro, okazis kunsido en Ljubljana por pritraktadi kaj findecidi pri la interna regularo de Alp-Adriaj Konferencoj, cele al formala akcepto de esperanta sekcio kiel laborgrupo ene de la oficiala Alp-Adria Laborkomunumo.

### Propagando

Enkadre de disvastiga agado, mi mencias kelkajn iniciatojn:

Estis okazigita la 28[an] de februaro prelego en la Kolegio de Unuiĝinta Mondo en *Duino*, kie studas la 17-jara norvega esperantisto Stian Haklev. Parolis anglalingve Anna Löwenstein Corsetti pri «Ĉu vere la angla estas la monda lingvo?» Ne tiel nombra estis bedaŭrinde la publiko, kiel supozite, tamen la okazo donis eblecon havi kontaktojn kun profesoro Guetchev, tie laboranta, kiu eventuale en estonto povus favori aliajn similaĵojn poresperantajn en tiu fama lernejo.

Komence de la jaro, la kulturaj instancoj de Milanowek kunlabore kun la loka Esperanto-grupo estrata de Andrzej Pettyn, lanĉis internacian konkurson de desegnaĵoj por lernejanoj, okaze de la 100-jariĝo de tiu pola urbo. Temo estis «Mia malgranda patrujo». Pri tio estis informitaj en Triesto lernejaraj direkcioj, ĵurnaloj, televizioj kaj radioj. Per la grava kunlaboro de la asocio CAMMINA TRIESTE-COPED, oni prezentis la projekton antaŭ nombra publiko en la lernejo ***D. Rossetti* (*Via Zandonai*)**: pri ĉio ĉi amplekse raportis IL PICCOLO, dum en la novaĵĵurnalo de TELE4 oni vidigis, kelkminute, la oka-

zaĵon. Antaŭ ol sendi la desegnaĵojn al Pollando, ĉe nia sidejo ni organizis, fine de aprilo, ekspozicion pri la ellaboraĵoj de la knaboj, sur kiuj ĉiuj tekstoj estis tradukitaj esperanten. Tiuokaze, dum la inaŭgura tago, ĉeestis ĵurnalistoj (PRIMORSKI DNEVNIK, IL PICCOLO kaj aliaj) kun fotistoj. Venis ankaŭ la prezidanto de la Asocio CAMMINA TRIESTE, s-ro Tremul, kaj la direktorino de la elementa Lernejo. Sekvis, kompreneble, detala raporto sur la koncernaj ĵurnaloj. Entute estis senditaj al Pollando 47 desegnaĵoj.

Ene de la Kampanjo «Eŭropaj voĉdonoj», okaze de la balotado por renovigo de la Eŭropa Parlamento ($13^{an}$ de junio) estis senditaj al niaj regionaj kandidatoj leteroj kun demandaro rilate al solvo Esperanto, sed neniu reagis.

Ekde de oktobro ni dismetadas plurloke (komunuma publik-rilata oficejo, komercaj centroj, vendejoj, butikoj ka) priesperantajn flugfoliojn propagandcele, kun ĝeneralaj informoj pri okazigo de kursoj, sen indiki precizan daton, tiel ke ili povas esti uzataj dum la tuta jaro. Fakte tia estas la intenco.

En decembro, nia Prezidanto sendis leteron al Paolo Ciani, vicprezidanto de Regiona Estraro, proponante instruadon kaj uzon de Esperanto kiel labora lingvo inter volontularo laboranta en ĉelima areo, enkadre de civila protektado. Sed ni atendas ankoraŭ respondon.

Kaj nun iom da ciferoj: TEA akiris en 1999 4 novajn anojn plus du kiuj renovigis sian aliĝon post kelkjara halto. La estraranoj kunsidis entute 6 fojojn. Estis ricevitaj 55 leteroj kaj elsenditaj 46, nekalkulante la multobligitajn cirkulerojn, informleterojn, retmesaĝojn, diversajn propagandilojn, anoncojn al ĵurnaloj, radioj ks. Ĉijare, kompare kun la pasinta, oni povas esti kontentaj pri la sufiĉe ofta aperigo de anoncoj kaj artikoloj, diverstemaj, fare de la lokaj amaskomunikiloj.

La asocia informilo, TEA-BULTENO, aperis 11 fojojn anstataŭ 12, pro aŭgusta feriado. La presaparato, sub estrado de nia kasisto, daŭre eligas centojn da varbiloj, cirkuleroj, bondezirleteroj, ks.

Duone de februaro TEA akiris, tute senpagan, interretan kunligon pere de Triesta Komunumo: krom poŝta adreso, tie ni havas ankaŭ TTT-paĝon. Tio estis bona ŝanco por nia asocio, ĉar, tiam kiam ĝi estis instalita, oni devis pagi sufiĉe altan sumon por tiu servo. Nun ne plu estas tiaj problemoj, ĉar ekde la duono de ĉi tiu jaro pluraj kompanioj ofertas senpagan konekton. Tiam ankaŭ por tio oni devis labori, ĉar vi ja scias, ke nenio venas per si mem: oni devas agi por akiri ion ajn.

Menciindas ke Regiono Friulo-Julvenetio rekonis TEAN kiel volontulan asocion en la kampoj kultura kaj de internacia solidareco kaj ke ni troviĝas en la oficiala listo de Volontula Agado ĉe la numero 531.

Antaŭ ol fini ĉi tiun raporton, notindas kaj substrekindas la grava helpo kiun Eraldo Sepulcri malavare donadas al nia asocio. Certe vi ĉiuj scias, ke s-ino Liliana Siega-Delmonaco jam enkomputiligis 1077 librojn de nia Biblioteko, kio signifas horojn kaj horojn ĉe tajpado, sed tiu impona laboro ne realigeblus, se s-ro Sepulcri ne estus elpensinta specialan programon, kun esperanta karaktraro, tute taŭgan por niaj bezonoj. Mi sugestas al vi, ĝin rigardi, mem konstati kiel ĝi funkcias, ĉar io simila ne troveblas en vendejoj, eĉ ne en tiuj plej moderne ekipitaj.

Kaj, ankoraŭ, ne forgesindas lia lasta livero. Por Kristnaska kaj novjara festoj li pretigis tri mirindajn poŝtkartojn, kun koloraj grafikaĵoj, kiujn ni presigis en Hungario, helpe de s-ro Kapcsandi el Zalaegerszeg. Certe vi ĉiuj vidis kaj espereble multnombre aĉetis ilin: tion farante, vi ja helpas vian asocion sed ankaŭ vi elmontras vian aprezon al lia laboro. Konkretan aprezon li jam ricevis de UEA: en la januara revuo ESPERANTO unu el tiuj poŝtkartoj aperis kovrilpaĝe, kio signifas ke vere ili meritas esti admirataj tra la tuta mondo. Ni ricevis entuziasmajn reagojn fare de unuopuloj en Italio kaj alilande, kluboj el Francio kaj de la redaktoro de LA VERDA LUPEO (en Germanio), kio certe favoros ilian pluan disvendadon inter ĉiukontinenta esperantistaro. Ni provis eĉ vendi ilin en triesta tabakvendejo, sed bedaŭrinde la "normala" publiko ne reagis tro pozitive.

Jen, mi kredas ke mi sukcesis resumi la laboron, faritan en $1999^{a}$ jaro, de la foriranta estraro. Dankon pro la atento kaj al vi nun la parolon.

## Raporto de Triesta Katedrestro

*Elda Doerfler*

La resumo de la agado de triesta katedro ne entenas multajn konkretajn rezultojn, malgraŭ ke dum la jaro oni klopodis iel altiri novajn lernantojn.

La kurson, programitan por la $28^{a}$ de januaro $1999^{a}$, oni propagandis per cirkuleroj, kiujn oni sendis al pli ol 70 asocioj, kaj per informleteroj al lernejaraj direkcioj (kun aldonitaj sciigoj rilate al aktiveco de nia asocio kaj la ebleco lerni E-on per korespondaj kursoj, informoj pri la konkurso de desegnaĵoj en Milanowek plus la libro LUDU KUN NI). Ĝin plurfoje anoncis kaj ĵurnaloj kaj radio, dum konstantaj, plursemajnaj reklamoj aperis en MERCATINO kaj KONRAD - ĉi-lasta zorge de Maria Rosati.

Danke al la surloka apogo kaj agado de Anna Rustici, oni disvastigis la kursojn ene de la Paperfabriko de ***Timavo-Duino***, kie ŝi laboras, pere de dise afiŝitaj varbiloj. Bedaŭrinde ĉio ĉi tute ne efikis. Fakte en la kurso enskribiĝis neniu! Iom pli poste mi komencis - por unu sola malfrua sinanoncanto! - elementan kurson: tiu, post la somera paŭzo, ne plu povis daŭrigi la lernadon. Tamen, iasence, tio donis la okazon komenci ekzercigan kurson por homoj bezonantaj denovan trarigardon de la 16 gramatikaj reguloj. Ĝi, nuntempe vizitata de 3 asocianinoj, okazas ĉiun vendredon je la $18^{a}$ horo.

Sekve de la lanĉo de internacia konkurso pri desegnaĵoj por infanoj kaj knaboj en Milanowek (Pollando) perita de Andrzej Pettyn, estis kontaktitaj pli ol 15 lernejaraj direkcioj. Post gazetara konferenco, organizita per la kunlaboro de la Asocio CAMMINATRIESTE en la elementa lernejo ***D. Rossetti***, aperis ampleksa artikolo pri la konkurso kaj pri Esperanto en la tagĵurnalo IL PICCOLO.

En novembro triope ni rendevuis kun la direktorino de tiu lernejo, s-ino Rita Manzara, kun kiu oni interkonsentis pri iu matena prezento de Esperanto al kelkaj klasoj, kunlabore ankaŭ kun alia instruistino, tre entuziasma kaj aktiva. La prezentado okazis la $29^{an}$ de novembro. La publiko konsistis el 150 gelernantoj de la $3^{a}$, $4^{a}$ kaj $5^{a}$ klasoj, kiuj atente aŭskultis la prelegon pri Esperanto kaj Zamenhof, kies fina celo estis la propono de starigo de interlerneja korespondado pere de Esperanto. Por la infanoj estis preparitaj tre simplaj sed okulfrapaj, koloraj informiloj kaj estis ekspoziciita kelkdeko da infanaj libroj. Ĉio estis akceptita tre favore kaj la infanoj montris sian

intereson per pluraj demandoj kaj klarigpetoj. Ni havas bonajn esperojn ion fari en tiu ĉi kampo ankaŭ danke al la disponebleco de Rosanna Malaroda. Kun la direktorino de tiu lernejo oni parolis ankaŭ pri ebleco aliĝi al Projekto Interkulturo lanĉita de ILEI.

Antaŭ ol fini, mi informas vin ke la $29^{an}$ de oktobro, okaze de kunsido de triesta instruistaro, mi estis reelektita kiel katedrestro por la sekvaj tri jaroj, kaj ke dum la tuta jaro, escepte de la someraj monatoj, ĉiulunde Maria Rosati gvidas konversacian/legadan kurson.

## Elektoj dum la Jarasembleo

Post la balotado, rezultis elektitaj por la jaro 2000 la jenaj kvin personoj:

**Estraro**

**Ackermann Edvige** - *prezidanto*
**Zerpini Elena** - *vicprezidanto*
**Doerfler Elda** - *sekretario*
**Valle Giuseppe** - *kasisto*
**Delmonaco Liliana** - *konsilanto-bibliotekisto*

**Administraj revizoroj**

**Nocent Elio kaj Zerpini Amalia**

En ĉi tiu malfacila periodo pro sidejaj problemoj, sincere ni deziru al TEA-gvidantaro multe da kapablo, forto kaj bonŝanco por superi, sendifekte, tian ŝtorman momenton.



## SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO
## 21-27 februaro



Interesa programo en preparo por inde festi la Internacian Amikecon. Ni jam komencas **vendredon la $18^{an}$** per interreta navigado: ni vizitos la ejojn de eŭropa kaj ekstereŭropa esperantista amikaro. **Vendredon la $25^{an}$**, TOMBOLO!!! Ne maltrafu ĉi tiun okazon gajni riĉegajn premiojn.

Kaj kio **dimanĉe**? Apogea ero estos la INTERNACIA GASTRONOMIA KONKURSO **2000**, per kiu TEA intencas omaĝi la kulinaran arton de aliaj popoloj. Sed antaŭe, je la
➔9.45 h. - rendevuo antaŭ la Muzeo de Hebrea Komunumo *«Carlo e Vera Wagner» - via del Monte 5*, por viziti, je la $10^{a}$ h., la ekspozicion: «YIDDISHLAND - Historio kaj bildoj pri la Hebreaj Komunumoj de centr-orienta Eŭropo tra poŝta dokumentaro». Kaj poste, je la
➔13.30 h. - en la sidejo de TEA por gustumi la pladojn preparitajn de la konkursantoj!!!

**Regularo de INTERNACIA GASTRONOMIA KONKURSO 2000**

La partoprenontoj en la konkurso devas pretigi tradician pladon de alia lando. Laŭ propra elekto, ĝi povas esti vianda, fiŝa, legoma, aŭ miksita (vianda-legoma, vegetara, ks). Dolĉaĵoj estos bonvenaj, sed - atentu! - eksterkonkursaj! Nepre, absolute kaj devige, tiuj kiuj emas batali kun aliaj konkurantoj sur kuir-kampo kaj deziras proponi sian frandaĵon al severa juĝantaro, devas anonci sin ĝis la $25^{a}$ de februaro al TEA-sekretario.

Ĉiuj ĉeestontoj juĝos la konkursaĵojn, kaj per apartaj slipoj donos la poentojn al la plej ŝatata manĝo. Al ĉiu plado oni atribuos poentojn de unu ĝis dek, kaj venkos la unuaj tri kiuj ricevos la plej nombrajn voĉojn. Belaj premioj certe kontentigos la konkursintojn.

Partoprenkondiĉoj: ➔ senpaga por la konkursantoj
➔L. 10.000 por ĉiuj aliaj.

Nepras tamen, por sukcesa aranĝo, antaŭanonci sin ĉe TEA-sekretario, kaj por la vizito kaj por la tagmanĝo.

## Por koni pli bone nian Trieston!

Dimanĉon la $23^{an}$ de januaro: Malvarma temperaturo, forta norda vento (nia amata ***bora***), iom nuba ĉielo tute ne estis kialoj por rezigni je partopreno en la promenado tra «Triesto ŝanĝiĝanta». Vere interesan programon pretigis CAMMINATRIESTE-COPED, kies prezidanto, s-ro Tremul, armita per laŭtparolilo (ja tre bezonata, ĉar la ventego malice forbalais ofte la klarigajn vortojn de la gvidantaro), je la fiksita horo atendis la partoprenantaron apud la Katedralo de S. Justo. Alvenis entute ĉ. 80 personoj (estis antaŭviditaj pli ol 200): do, tiu nombra ĉeesto, spite al veteraĉo, atestis la deziron de triestanoj vivi en medio malpli poluciita pro troa, senbezona uzado de aŭtomobiloj, kaj ankaŭ esti adekvate informitaj pri la diversaj projektoj de restrukturado kaj renovigado de nia urbo. Daŭris pli ol du horojn la promenado, kaj akompanis nin du arkitektoj kaj la skabeno pri publikaj laboroj, kiuj amplekse prezentis la planojn kaj programojn por plibonigi, estetike kaj celkonforme, la urbocentron, respekte de la historio kaj ĉefe de la bezonoj de la enloĝantaro.
Do, pro la persista, volontula agado, medi-protekta, de CAMMINATRIESTE, ni havis ŝancon pli bone koni kaj ĝui nian propran urbon.

## @ ⟵ Kio estas tio?

Male al tio kion oni povus supozi, la signo @ tute ne estas la ido de la komputil-epoko. Temas fakte pri simbolo frukto de kunfandiĝo de du literoj, **a** kaj **d**, konsistigantaj la latinan prepozicion ***ad***, kiu signifas ĉe, apud, al.

Post kunmeto de la du literoj, la stangeto de litero **d** troe kurbiĝas maldekstren. Ĉio ĉi okazis pli-malpli en la $6^{a}$-$7^{a}$ jc. p.K., sed ankaŭ nuntempe tiu signo estas uzata, en la komerca korespondado, kaj tial bone videbla sur la klavaro de tajpilo. Tre facile klarigeblas ke la ekuzon de @ por la interreta poŝto oni ŝuldas al ĝia origina signifo de «ĉe» (***ad***, nome ***at*** en la angla).

Jen kuriozaĵo: tra la mondo oni aŭdas tre diferentajn manierojn ĝin nomi. En Italio ĝi estas nomata ***chiocciola*** (heliko), en Nederlando ***apestaart*** (simia vosto), en Hispanio ***arroba*** (mezur-unuo por la vino), en Norvegio ***kanec-bolle*** (spiralforma cinam-torto), en Germanio ***klammeraffe*** (arane-simio), en Danio ***snabel-a*** (elefanta rostro), en Francio ***escargot*** (heliko).

Kiel, kara leganto, en via lingvo?

**Esperanta Turisma Societo Ljubljana**
Sideja adreso: Tavĉarjeva 2
Poŝta adreso: pk 1621
SI-1001 Ljubljana

**Februara programo** - Ĉiuĵaŭde je la 19.30 h.

**03.02** Novaĵoj el esperanta gazetaro
**10.02** Lingva vespero
**17.02** Diapozitivoj pri adriaj urboj - $3^{a}$ parto kaj Tago de Internacia Amikeco
**24.02** Jarkunveno

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349